

JESUS MOINHOS PARDAVILA

## **Antaŭnomoj en Esperanto: formoj, ensembloj, rilatoj**

**Abstract (Proper names in Esperanto: forms, sets, relationships).** This article discusses the existence of an anthroponymic system in Esperanto. First the author collected a corpus of Esperanto-motivated names. Further analysis showed that not all cases were found inside the Esperanto language community, and that there are more cases of female than of male names. A taxonomical study enabled a classification into several sets which was compared with the situation in other languages; two of those sets, the culture-motivated names (and its subdivisions) and the nature-motivated names, presented a diachronic distribution. Finally, the author studies the strategies in name-giving practices in the Esperanto language community and the role therein played by language loyalty, and describes regional differences in name-giving practices.

**Resumo.** Tiu ĉi artikolo esploras la ekziston de antroponimia sistemo en Esperanto. Unue la aŭtoro kolektadis korpuson konsistantan el Esperanto-motivataj nomoj. Posta analizo de la korpuso montris, ke ne ĉiuj kazoj lokiĝis en la esperanta lingvokomunumo, kaj ke estas pli da kazoj de inaj nomoj ol de viraj. Taksonomia studo ebligis klasifikon en plurajn ensemblojn, kaj tio estis komparita kun la situacio en aliaj lingvoj; du el tiuj ensembloj, nome la kulture motivitaj nomoj (kaj ties subdividoj) kaj la nature motivitaj nomoj, montris diakronian distribuon. Fine, la aŭtoro studas la strategiojn en nomdonado ene de la esperanta lingvokomunumo kaj la rolon ludatan en ĝi de lingva lojaleco, kaj priskribas la regionajn diferencojn en nomdonado.

### **Enkonduko**

En ĉiuj lingvokomunumoj ekzistas propraj personaj nomoj. Oni ofte parolas pri la antroponomia sistemo de lingvo. Tiu antroponomia sistemo radikas en la historio de la koncerna lingvokomunumo, kaj evoluas samtempe kun ĝi. Tamen la esperanta lingvokomunumo ne havas longan historion. Tiel leviĝas la demando, ĉu ekzistas antroponomia sistemo en Esperanto. Ĉi tiu laboraĵo prenas la supran demandon kiel orientigilon kaj samtempe celas trovi respondon al ĝi.

## 1. Teoria kadro kaj rilataj fakaj priskriboj

La koncepta kadro en kiu disvolviĝas tiu ĉi esploro estas antroponomastiko, branĉo de onomastiko, kiu siavice estas la fako pri la studo de propraj nomoj. Antroponomastiko temas pri personaj propraj nomoj. La jena studo fokusiĝas sur la ekziston de antroponomia sistemo en Esperanto de vidpunkto enkadriĝebla en lingvoscienco kaj socilingvistikon.

Du estas la ĉefaj terminoj uzataj en filologiaj aliroj al la komplekseco de personaj nomoj: *antroponomastika* (aŭ hiperonime: *onomastika*) *korpuso* kaj *antroponomastika sistemo*. *Korpuso* estas kolekto por analizo, dum la termino *sistemo* implicas la ekziston de interna organizo, kiu donas formon al ĝi<sup>1</sup>. Aldone, mi uzas la koncepton *lingvokomunumo* por montri homgrupon kies ĉefa trajto estas uzado de kundividita lingvo (Ruiz i San Pascual, Sanz i Ribelles kaj Solé i Camardons 2001<sup>2</sup>).

La nacilingvaj onomastikaj sistemoj ne estas senŝanĝaj. Ilia konstanta ŝanĝiĝo estas determinata de spaca-tempaj parametroj. Aliflanke, propraj nomoj estas sociaj fenomenoj, kaj ili dependas pli ol komunaj nomoj de eksterlingvaj faktoroj — ilin reguligas sociaj kaj historiaj leĝoj (Habibli 2011).

Mankas studoj pri la nomdonaj kutimoj de esperantistoj, kio rekte kondukis al konsultado de ĉefe neesperantaj fontoj. De tiu vidpunkto, montriĝis aparte interesaj por dokumentiĝo fakaj artikoloj pri onomastiko en aliaj lingvoj. Ekzemple, Boullón kaj Tato (1999) rikoltas informojn pri la formiĝo de la galega sistemo de personaj nomoj kaj prezentas tiujn datumojn kronologie. Ili poste konigas la nunajn nomdonajn tendencojn. En posta laboraĵo Boullón (2007) centriĝas sur la elekton de nomoj en Galegio fine de la pasinta jarcento kaj analizas la fontojn por nom-renovigo, kio ĵetas lumon sur la temon de ĉi tiu esploro. Similaj studoj pri alilingvaj onomastikaj sistemoj kompletigis la menciitajn laboraĵojn. Pro alireblaj kialoj, krom galegaj studoj ankaŭ rumanaj iĝis grava informfonto. Samtempe kun la ampleksiĝo de la esplorado, aliaj laboraĵoj montriĝis utilaj, kiel tiu de Watanabe (2009) pri nomdona lingvopolitiko en Japanio kaj la studoj de Saarelma (2009) kaj Neethling (2000) pri nomoj en Afriko.

## 2. Antaŭkonsideroj kaj hipotezoj

Antaŭ ol komenci la esploradon, kelkaj konceptoj evidentiĝas kiel konsiderindaj:

<sup>1</sup> Difino de *sistemo* en NPIV: 4. *Kompleksaĵo, kunarango de aĵoj diversaj, sed analogaj, aŭ partoj en organizitan tuton* (PIV)

<sup>2</sup> La aŭtoroj aldonas, ke la difino taŭgas nur por la naturaj lingvoj historie difinitaj (tio estas, kontraste kun la artefaritaj lingvoj, por kiuj ili ne akceptas la ekziston de lingvokomunumo). Tiu ĉi specifaĵo ne konsideriĝis en la nuna studo.

- 1) Studo pri esperantaj nomoj devas alfronti la fakton, ke la parolantoj de Esperanto troviĝas dise en multaj mondregionoj kaj landoj, kio ne faciligas la inform-kolektadon.
- 2) Tio signifas ankaŭ ke mankas nomregistroj, kiuj konsistigas gravan referencon en aliaj onomastikaj studoj. Mankas ankaŭ onomastikaj universitataj fakoj, kiuj okupiĝu pri esperanta antroponomastiko.
- 3) Aliflanke, ne estas unueca leĝaro por reguligo de nomdonado. Leĝoj ŝanĝiĝas de unu al alia ŝtato, kio povas kondiĉigi la rezultojn de la esplorado.
- 4) La ekzisto de diversaj socikulturaj devenoj povas krei barojn por la esplorado; gravas do klarigi la celojn de la enketo al informantoj.  
Samtempe kun tio, estas espereble:
  - a) Trovi antroponomikan korpuson, kiu strukturiĝas laŭ analoga maniero al tiu de sistemoj ekzistantaj en etnaj lingvoj, kaj diakronie kaj laŭloke.
  - b) Trovi nur aŭ ĉefe eŭropajn informantojn. La dono de esperantaj nomoj al ido povas esti ligita al la fenomeno de familia uzado de la lingvo kaj do al denaskaj esperantistoj. Tiaspecaj familioj ekzistas ĉefe en Eŭropo (Corsetti 2004).
  - c) Trovi personojn kun esperantaj nomoj nur ene de la esperantlingva parolkomunumo.

### 3. Proceduro

Surbaze de tiuj antaŭkonsideroj kaj hipotezoj mi esploris la nomdonajn kutimojn ene de la esperanta lingvokomunumo. Mi elektis sortimenton da diversspecaj esplormetodoj, nome individua parola intervjuo, individuaj enketiloj, kaz-studado kaj bibliografia esplorado (gazetoj kaj revuoj, libroj kaj artikoloj, filmoj). Konsiderante la vastan geografian areon en kiu enkadriĝas la nuna studo, interreto evidentiĝis tre utila; ĝi ebligis rektan kontakton kun informantoj kaj serĉadon de kazoj per sociaj retoj (Facebook) kaj dissendo-grupoj (*Denask, Esperanto en Togolando, Iberia esperantistaro*).

La ĉefa tekniko uzita por individuaj parolaj intervjuoj kaj enketiloj estis la t.n. *neĝobulo*: oni komencis per malgranda nombro da kazoj, kiu sekve gvidis al aliaj, tiel ke la aro grandiĝis. Mi garantiis al la intervjuitoj kaj enketitoj absolutan anonimecon rilate ilian identecon (tio inkludis ne riveli iliajn familiajn nomojn) kaj samtempe ne diskonigi biografiajn informojn. Tamen baza kono pri la vivo de informanto povas helpi por sukcesaj rezultoj: kiam montriĝis, ke la koncerna homo ne plu rilatas al Esperanto, aŭ neniam faris tion, mi preferis nacilingvan aliron al li/ŝi por ebligi neŭtralan, neperfortan interagon. La korpuson mi kolektadis inter septembro 2014 kaj junio 2015.

Ŝlosila parametro por kribrado de la studotaj nomoj estis motiviĝo. Por Naumann (1987) “propraj nomoj, almenaŭ ĉe la momento de sia naskiĝo, estas pli-malpli motivitaj”; se Esperanto estas unu el la motivoj de nomdonado (ĉar la nomo havas signifon en Esperanto aŭ estas E-kulture motivita), tiu nomo eniris la studitan korpuson. Per tiu kriterio mi celis forigi hazardajn koincidojn.

Do la demandoj, (al gepatroj, nomportantoj, iliaj idoj) celis kolekti informojn pri tio, ĉu Esperanto influis sur la nom-elekton, kaj pri la kompleta oficiala nomo, genro kaj naskiĝ-jaro de la koncerna homo.

En la studo estis konsideritaj:

- A. Loko. Ĉiuj landoj kie estas alireblaj, kontakteblaj esperantistoj. Mi sendis anoncojn pri la esplorado al diversaj landaj kaj fakaj E-asocioj en la kvin kontinentoj.
- B. Tempo. Kadre de la leksiko de lingvo, kaj eĉ kompare kun aliaj kampoj de onomastiko, antaŭnomoj konsistigas areon aparte sentivan al kulturaj ŝanĝoj (Boullón kaj Plaza 1999). Tiel, la antroponimia sistemo de lingvo radikas en la historio de la koncerna lingvokomunumo kaj evoluas samtempe kun ĝi. Laŭ tiu perspektivo, mi konceptis tiun ĉi studon kiel diakronan, ĉar la ebleco pri tratempa aspekto de nomdonado montriĝis tre interesa por kompletigi la rezultojn bazitajn sur nuntempaj ekzemploj.
- C. Genroj. La studo ne estis genre orientita, kaj ĝi ampleksas virajn kaj virinajn nomojn.
- D. Formoj. Por la la celoj de la nuna studo mi konsideris unuopajn substantivojn, eĉ se ili estas formantoj de kunmetitaj (plur-eraj) leksikaj unuoj. Aliflanke, kiam la diferencoj inter diversaj nomoj estis minimumaj aŭ ŝuldiĝas al la specifaj reguloj de nacia lingvo (kio tamen ne malebligas esperantan prononcon), ili estis arigitaj en unu solan kapnomon: *Esperantina*, *Esperantyna*. Same, se la nomo estis oficiale registrita laŭ la ortografio de loka nacia lingvo, ĝi estis envicigita en la studitan korpuson ĝuste en tiu formo: *Stella*, *Wanda*.
- E. Oficialeco. Nur oficialaj antaŭnomoj estis akceptitaj. Karesnomoj kiel *Bela* (el *Isabella*), esperantigoj kiel *Antono* aŭ aliigoj kiel *Novulo* (de la oficial-dokumenta *Nobuo*) ne estis enkorpusigitaj.

#### 4. Rezultoj kaj diskuto

En la sekvaj tabeloj montriĝas la personaj nomoj kolektitaj en la nuna esploro, klasifikitaj laŭ genroj, ofteco, lando kaj jardeko. Entute mi trovis 88 nomportantojn. La virina tabelo ampleksas 42 nomojn<sup>3</sup>. Siavice, la tabelo kun viraj nomoj estas malpli granda kaj entenas nur 24 nomojn.

---

<sup>3</sup> En la kazoj, kiam estis transloĝiĝo, mi registris en la fako *Landoj* nur la nomon de la naskiĝlando.

Tabelo 1. Esperante motivitaj virinaj nomoj en la periodo 1887-2015.

<b>N-ro</b>	<b>Virinaj nomoj</b>	<b>Ofteco</b>	<b>Lando(j)</b>	<b>Jardeko</b>
1	Aminda	3	Svedio Togolando Italio	1980 1990 2000
2	Esperantina, Esperantyna	3	Bulgario Pollando Pollando	1920 1950 1940
3	Mirinda	3	Svedio Benino Togolando	1990 1990 2010
4	Vera	3	Germanio Italio Hispanio	1960 2000 2010
5	Benata	2	Nederlando Togolando	1950 1990
6	Flora	2	Hispanio Francio	2000 2000
7	Linda	2	Ĉeĥoslovakio Hungario	1980 1980
8	Maja	2	Jugoslavio Germanio	1970 2010
9	Milda	2	Argentino Novzelando	1940 1990
10	Suna	2	Kanado Germanio	1950 2000
11	Altina	1	Benino	2010
12	Ami	1	Togolando	1990
13	Amindas	1	Togolando	1990
14	Beatrico	1	Brazilo	1950
15	Belonia	1	Francio	1980
16	Benita	1	Togolando	2010
17	Brila	1	Kanado	1960
18	Danka	1	Jugoslavio	1970
19	Dia	1	Benino	2000
20	Donita	1	Nederlando	1950
21	Esperanto <sup>1</sup>	1	Rumanio	1900
22	Etelka	1	Nederlando	1970
23	Etulo	1	Togolando	2000
24	Feina	1	Sovetunio	1920
25	Feliĉa	1	Nederlando	1950
26	Florida	1	Benino	2010

27	Frida	1	Germanio	2010
28	Idea	1	Benino	2000
29	Ina	1	Pollando	1960
30	Ino	1	Germanio	1910
31	Klara	1	Germanio	2000
32	Kristina	1	Kolombio	1970
33	Lilia	1	Brazilo	1950
34	Luma	1	Francio	2000
35	Lumo	1	Japanio	1980
36	Marta	1	Portugalio	1990
37	Meva	1	Germanio	1990
38	Sana	1	Japanio	1980
39	Serena	1	Italio	1960
40	Stella	1	Norvegio	1960
41	Venko	1	Togolando	2000
42	Wanda	1	Nederlando	1970

<sup>1</sup> *Maria Esperanto* estis la kompleta nomo.

Tabelo 2. Esperante motivitaj viraj nomoj en la periodo 1887-2015.

N-ro	Viraj nomoj	Ofteco	Lando(j)	Jardeko
1	Esperanto	3	Brazilo (2), Hispanio (1)	? <sup>1</sup> 1910
2	Ludoviko	3 <sup>2</sup>	Nederlando Usono Kolombio	1930 1960 1970
3	Alko	2	Kanado Hungario	1950 1970
4	Espero	2	Nederlando Togolando	1950 2000
5	Kai	2	Svislando Japanio	1980 1990
6	Roberto	2	Nederlando Nederlando	1930 1930
7	Amato	1	Nederlando	1930
8	Atuto	1	Japanio	1970
9	Bennato	1	Nederlando	1970
10	Ernesto	1	Kolombio	1970
11	Fidel	1	Svislando	1980
12	Fidul	1	Benino	2000

13	Gravul	1	Benino	2000
14	Holdo	1	Germanio	1910
15	Ideal	1	Francio	1980
16	Johano	1	Nederlando	1930
17	Kamilo	1	Kolombio	1970
18	Kanto	1	Japanio	1960
19	Karlo	1	Brazilo	1960
20	Lariko	1	Hungario	1980
21	Libereso	1	Italio	1925
22	Pregħi	1	Togolando	1990
23	Samideano	1	Italio	1970
24	Zamenhof	1	Brazilo	1950

<sup>1</sup> Temas pri patro kaj filo, probable ambaŭ naskiĝintaj en la unua duono de la 20-a jc.

<sup>2</sup> En la esploroj aperis plia *Ludoviko* el Kolombio. Temas pri esperantigo en adolta aĝo de la nacilingva nomo. Pro tiu ĉi aparta trajto ĝi ne enkalkuliĝis en la grafikajoj.


#### 4.1. Aparteno al la esperanta lingvokomunumo

Kvankam preskaŭ ĉiuj unuopaj kazoj troviĝis ĉe personoj apartenantaj al la esperanta lingvokomunumo, estas kelkaj ekzemploj, en kiuj tio ne okazas: *Samideano*, *Zamenhof* kaj du *Esperanto*.

#### 4.2. Genro

Konstateblas pli alta nombro de virinaj nomoj ol de viraj (Figuro 1). Oni devas rilatigi tion al la fakto, ke la vira nomdonado ofte estas pli konservativa en pluraj lingvokomunumoj. Nomdonado al filinoj estas konsiderata *malpli grava* ol al filoj, kaj tial oni lasas pli da spaco al fantazio. Novkreitajn nomojn oni aljuĝas ĉefe al virinoj, kio vastigas la gamon da elekteblaj nomoj; tio aparte okazis fine de la 20a jarcento (López Franco 2009). Tiel, en la studita korpuso 63% el la nomoj estas inaj kaj nur 36% estas viraj. La elcentoj laŭ la nombro de nomportantoj estas 63% da virinoj kaj 36% da viroj.

Figuro 1. Elcentaĵoj el inaj kaj viraj nomoj en la studita korpuso.



### 4.3. Taksonomio. Kronologio


Laŭ la ekzemploj de diversaj aŭtoroj (kiel Boullón 2007, Morărașu kaj Drugă 2011, Raátz 2008 k.a.) eblas prezenti taksonomian klasifikon de la kolektita nomkorpuso. Kelkfoje tamen la divido ne evidentiĝas tiel simpla, kaj nomoj povas samtempe aparteni al diversaj kategorioj:

1. Tradiciaj kristanaj eŭropaj nomoj: *Beatrico, Marta, Klara, Kristina; Ernesto, Johano, Kamilo, Karlo, Roberto*. Temas pri la t.n. *kalendaraj nomoj*, kiuj aperas en unulingvaj esperantaj vortaroj (PIV, NPIV).
2. Aliaj kristanaj eŭropaj nomoj: *Benata, Benita, Dia, Bennato, Preghi*. Kristanaj nomoj malpli oftas en okcidentaj socioj, ĉiam pli laikaj, ekde la dua duono de la 20a jc. (López Franco 2009), kion signas la disflorado de nomoj apartenantaj al aliaj kategorioj, ĉefe en Eŭropo.
3. Nomoj devenantaj el la esperanta kulturo (Figuro 2). Apartan subgrupon en ĝi konsistigas la nomoj kun la radiko *esper-*: *Espero, Esperanto* kaj *Esperantina* (kun pola varianto *Esperantyna*). Aliaj estas *Zamenhof, Ludoviko, Stella, Samideano, Ideal, Venko* kaj *Wanda* (nomo de filino de Zamenhof). Tiun ĉi ensemblon estigas la unuaj specife esperantaj nomoj, kun du aperoj de la formo *Esperanto* jam en 1909 kaj 1910. Kvankam komence oni uzis la nomon *Esperanto* kiel epicenon (danke al kunmetado kun inaj substantivoj: *Maria Esperanto*), kelkajn jarojn poste aperis la kreita formo *Esperantina*, inigo kiu iom sukcesis. La subgrupo estis produktiva ĝis la 50aj jaroj de la 20a jc., kiam laste aperis la mildigita formo *Espero*. Nur en la komenco de la 21a jc. registriĝas alia kazo (denove *Espero*) en centra Afriko, neligita al la unuaj aperoj. La kazo de *Fidel* estas duba, ĉar kvankam laŭ la gepatra informo ili elektis tiun nomon interalie ĉar Fidel Castro partoprenis en la UK en Havano (1990), la ligo kun ĉi tiu nom-grupo estas diskutibla.



Duan, malgrandan subgrupon konsistigas nomoj devenantaj el literaturo: *Etelka* (nomo de rolulino en *La Cikoni-kalifo*, kies esperantigo fare de Karlo Bodó en 1929 estis tre sukcesa<sup>4</sup>) kaj *Marta* (nomo de fama romano de E. Orzeszkowa kaj de ties ĉefrolulino, tradukita de Zamenhof en 1910). Literaturo malfrue aperis kiel motiviĝo por nomdonado, nur en la 1970aj jaroj.

Notindas, ke en alilingvaj onomastikaj sistemoj troveblas antaŭnomoj kun kompareblaj motiviĝoj. Tiel, estas nomoj devenantaj de literaturo, historio kaj mitologio en la galega onomastika sistemo (inaj: *Rosalía, Ultraia, Suevia, Noega, Celtia*; viraj: *Breogán, Artai*) kaj en la rumana (inaj: *Doina* ‘balado’; viraj, aperintaj jam en la 19a jc.: *August, Aurelian, Decebal, Octavian, Tiberiu, Traian*).




Figuro 2. Kronologia apero de kulture motivitaj nomoj. La fajnaj linioj entenas la subgrupon de nomoj kun la radiko esper-; la dika linio enhavas la subgrupon de literature motivitaj nomoj.

4. Nature motivitaj nomoj. Ilia apero estas relative malfrua, kaj ili aparte koncentriĝas en la lastaj jardekoj. Menciindas la fakto, ke pluraj el ili registriĝis pli ol unu fojo, kio eble montras al solida enradikiĝo. Tri subgrupoj montreblas:
  - a) Luma: *Lumo, Luma, Suna*<sup>5</sup>.
  - b) Flaŭra: *Flora, Florida, Lariko, Lilia, Maja*.
  - c) Faŭna: *Alko, Meva*.

<sup>4</sup> *La Cikoni-kalifo* kalkuleblas inter la plej famaj kaj influaj tradukoj en Esperanto. Pri ĝi Totsche asertis, ke „nemultaj tradukaĵoj ricevis tiom da favoraj recenzoj, ankaŭ la Akademio rekomencis ĝin per laŭdo”, kaj K. R. G. Sturmer nomis ĝin “*gemo de nia literaturo*” (Totsche (1932). Valén (2004) asertis, ke ĝi estas “*impresa traduko en sia epoko*”.

<sup>5</sup> Komparu kun la galegaj *Estrela* ‘stelo’, *Luz* ‘lumo’ kaj *Sol* ‘suno’, kun la rumanaĵ *Luminița* ‘lumeto’ kaj *Steluța* ‘steleto’, aŭ kun la hispanaj *Estrella* ‘stelo’, *Lucero* ‘stelo’, *Luz* ‘lumo’ kaj *Sol* ‘suno’ (Mora Monroy 1976), ĉiuj inaj. En la 19-jarcenta Turkio aperis pluraj *lumaj* nomoj arab-devenaj laŭ la elstara metaforo pri lumo en tiamaj nacia, intelekta kaj persona vekiĝoj: *Nuri* ‘mia lumo’, *Ziya* ‘lumo’, *Şemsi* ‘suna’ kaj *Enver* ‘luma’ (Gürpınar 2012). En Esperanto la formo *Ste(l)la* havas alian motiviĝon, nome kulturalan.



Figuro 3. Kronologia apero de nature motivitaj nomoj.

Same kiel en Esperanto, en eŭropaj antroponomastikaj sistemoj la flaŭra subgrupo estas la plej ofta kaj ampleksa en la nature motivitaj nomoj, kutime kun nomoj de floroj kulture ligitaj al la ideo *virino*. Escepto en Esperanto estas la vira *Lariko*, nomo de arbo kun similaj ekvivalentoj en la hispana *Olmo* ‘ulmo’ kaj en la rumana *Codruț* ‘arbareto’ (kaj ĝia inigo *Codruța*) kaj *Crenguța* ‘branĉeto’. Aparta estas la faŭna subgrupo, kun nomoj (*Meva*, *Alko*) nekutimaj en hindeŭropaj lingvoj.

- Nomoj signifantaj trajtojn de la portanto. Ili jen baziĝas sur ecoj de la ĵusnaskito, jen estas aŭguraj nomoj, laŭ la latina moto *nomen est omen* ‘nomo estas aŭguro’: efektive, la ideo, ke estiĝas ligo inter nomo kaj ties posedanto ekzistas de ĉiam en multaj kulturoj (Zăbavă 2008). Tiel, troveblas: *Altina*, *Aminda*, *Amindas*, *Atuto*, *Belonia* (el *belo+nia*), *Brila*, *Danka*, *Etulo*, *Feina*, *Feliĉa*, *Fidul*, *Frida* (laŭ raporto de la gepatroj, ĉar la infano naskiĝis en vintro), *Gravul*, *Ina*, *Ino*, *Linda*, *Milda*, *Mirinda*, *Sana*, *Serena*, *Vera*. Kelkaj el tiuj nomoj, kiel *Aminda*, *Amindas*, *Mirinda*, baziĝas sur alilingvaj nomoj vaste konataj ĉar ekzistantaj en la angla onomastika sistemo, laŭmoda en la lastaj jardekoj: *Amanda*, *Miranda*. Rilate la naturon de *Ina*, *Ino*, estas memorinde, ke kristana nomo internacie konata: *Andreo* (*Andrew/André/Andrés/Andreas...*) etimologie signifas ankaŭ genron (aŭ sekson); ĝi venas el la greka *anēr*, *andrós* ‘viro’.
- Originalaj esperantaj nomoj kreitaj per mallongigo de aliaj nomoj: *Holdo*, aferezo el la germana nomo de la patro, *Reinhold*. Ĉi tiu estas la sola ekzemplo de kategorio, tiu de karesnomoj, sufiĉe fruktodona en la sistemoj galega (*Catuxa*, *Maruxa*, *Sabela*, *Xela*; *Xan*, *Xandre*, *Xaquín*; Boullón 2007, 2008) kaj rumana (*Anicuța/Anuța*; *Dorel*, *Costel*, *Ionuț*, *Nicu*, *Sandu*, *Vlad*; Felecan 2010, Trebeș 2014). En la du menciitaj lingvoj karesnomoj estas elinterna maniero renovigi la nomkorpuson kaj, kvankam ĝi ekzistas de mezepoko, ĝi estas aparte uzata ekde la fino de la 20a jc. (tamen ne en Esperanto).

La drasta forlaso de tradiciaj nomoj en Eŭropo en la dua duono de la 20a jc. estas vaste studita fenomeno (Kohlheim 1999), kaj ĝi same konstateblas en la esperantaj ekzemploj. Ĉi-kaze tradiciaj nomoj, t.e., tiuj formitaj per la radiko *esper-*, etendiĝas ĝis la 1950aj jaroj, kaj ilin samtempe anstataŭas nature motivitaj nomoj, al kiuj poste aldoniĝas nomoj literature motivitaj. Samtempe kun tio, nomoj kulture motivitaj

(ĝenerale) konsistigas daŭran kernon ĝis nun. Siavice, nomoj signifantaj trajtojn de la portanto ekzistas jam de tre frue (*Ino*, 1910) sed ili aparte koncentriĝas de la 1970aj jaroj ĝis nun.

#### 4.4. Strategioj en nomdonado

Alia menciinda aspekto rilatas al tio, kion Ofhoy nomas la *gepatra projekto* ĉe la elekto de la antaŭnomo, aŭ alivorte, kiel la elekto de esperanta nomo povas kondiĉigi la vivon de la filo aŭ filino (López Franco 2009). Se instruado de Esperanto al propra filo aŭ filino estas konsiderebla kiel ekstrema formo de *lingva lojaleco* (Fiedler 2012), ankaŭ doni esperantan nomon estas sammaniere rigardebla. De tiu vidpunkto, menciindas du strategioj celantaj ne kompromiti la idon pro la nomdono:

- a) Elekto de nomo en Esperanto ekzistanta ankaŭ en la antroponomia sistemo de la loka lingvo aŭ en tiu de kulture proksimaj lingvoj. Tiel oni evitas, ke la ido estu nepriduble ligita al la lingvo Esperanto, oni ne altrudas ĉi lastan kaj faciligas, ke eventuala estonta rompo de la *lingva lojaleco* ne komplikiĝu pro la elektita nomo. Temas pri relative oftaj ekzemploj kiel *Flora, Linda, Maja, Vera*, kaj de aliaj kiel *Danka, Klara, Marta, Serena, Ernesto* kaj *Roberto*.
- b) Elekto de duobla, triobla aŭ multobla nomo, tio estas, plur-era leksika unuo. Tio ebligas la ŝanĝon de nomo se la ido ne plu deziras esti nomata per esperanta nomo. Paradigma ekzemplo, tre frua, estas la longa nomo *Francisco de Asís Teodosio Esperanto* el Hispanio, sed aliaj kazoj estas troveblaj en diversaj landoj. Entute en la studita korpuso kalkuliĝis 27 kazoj de plur-eraj leksikaj unuoj, 33% de ĉiuj nomportantoj.

#### 4.5. Formoj

Kiel dirite, kelkaj nomoj estis adaptitaj al la reguloj de la nacia lingvo: *Esperantyna, Stella*. La kazo de *Libereso* estas iom aparta: adapto al la ortografio de la itala postulus la formon *Liberezo*, ĉar *Libereso* sonas [libe'ʃe:zo] en la itala. Kaj kvankam la informinto (ĉi-kaze la nomportanto) certigas, ke lia patro estis esperantisto kaj donis al li nomon en Esperanto, la formo eble ne hazarde koincidas kun la vorto por 'libereco' en ido.


El alia vidpunkto, notindas la transkategoriigo de pluraj el la kolektitaj nomoj. En la korpuso ne nur aperas nomoj *substantivaj* (viraj, en -o) kaj *adjektivaj* (inaj, en -a), kiel tradicie en Esperanto (Kalocsay k Waringhien 1985). Unu el la nomoj estas *konjunkcia: Kai* (adaptita formo de *Kaj*, elektita pro la kuniga eco de la vorto). Sed en Afriko troveblas ankaŭ nomoj *infinitivaj*<sup>6</sup> (*Ami, Preĝi*) kaj *prezencaj* (*Amindas*)<sup>7</sup>.

<sup>6</sup> Eble pro la substantiva karaktero de infinitivo, kiu povas roli kiel subjekto, objekto, komplemento ktp. (Wennergren 2005).

<sup>7</sup> Eble ĉar prezenco povas havi signifon eternan, ĉiaman, same kiel infinitivo (Wennergren 2005).

#### 4.6. Regionaj aspektoj

En la kolektita korpuso la nomportantoj apartenas al kvin kontinentoj (Figuro 4). Iom pli ol la duono estas el Eŭropo, kaj konstateblas grava, similkvanta grupo da afrikanoj kaj amerikanoj, malgranda aro el Azio kaj preskaŭ sensignifa ĉeesto de nomportantoj el Oceanio.



Figuro 4. Laŭkontinentaj elcentaĵoj de nomportantoj en la studita korpuso.

Landaj leĝoj kondiĉigas nomdonadon, kaj en pluraj kazoj malebligas la elekton de nomo en Esperanto. Ekzemple, ekzistas oficialaj nomlistoj al kiu ŝtatanoj devas adaptiĝi (Svislando) kaj aliaj entenantajn la oficialajn rezultojn de laŭvicaj konsultiĝoj pri eblaj nomoj (Portugalia). En Japanio listo da antaŭnomoj vigoras de 1951, kaj en 2004 ĝi estis draste ampleksigita. La ŝtata lingvopolitiko en Japanio decidas kiuj ideogramoj povas esti uzataj en la dokumentoj, inkluzive naskiĝ-registralojn; se la ideogramoj de iu nomo ne aperas en la listo *jinmeiyō kanji hyō*, tiu povas esti rifuzata. La nomlisto en Japanio montriĝas aparte grava nuntempe, kiam nomdonado baziĝas pli sur la dezirata identeco de la infano ol sur la konvenciaj nomoj por identigi la knabon en grupo (Watanabe 2007). La nomoj el Japanio ekzistantaj en la studata korpuso (*Lumo, Sana; Kai, Atuto, Kanto*) konformas al tiuj postuloj. Ekzemple, la nomo *Atuto* estas laŭleĝa ĉar la ideogramoj kiuj ĝin formas 淳人 aperas en la registara nomlisto. La nomon oni legas japane [aŝuuto] sed ĝi estas transskribita de la nomportanto kaj liaj familianoj kiel *Atuto* laŭ unu el la transskribaj metodoj, kio igas ĝin legebla en Esperanto kiel signifohavan personan nomon. En la japana ĝi signifas ‘sincera kaj honesta homo’.

En granda parto de Afriko ekzistas nuntempe du sistemoj de nomdonado, ĝenerale distingeblaj per la kriterio pri signifa karaktero de la antaŭnomoj: la tradicia kaj la eŭropa, alportita de la koloniaj potencoj (Saarelma 2009). La tradicia sistemo de nomdonado spertis reviviĝon en la 60aj jaroj, kiel sekvo de la afrikaj naciismaj movadoj. Ĝin karakterizas, kontraste kun la eŭropa, signifeco — afrikaj tradiciaj nomoj portas semantikan ŝarĝon, *havas signifon*.

La plej granda parto de la esperantaj nomoj en Togolando kaj Benino aperantaj en la kolektita korpuso sekvas tiun ĉi principon. La signifo laŭ Saarelma povas rilati al:

- la emocioj de la gepatroj je la naskiĝo de la bebo (*Ami, Amindas, Etulo*),
- zorgoj de la gepatroj pri la estonto de la ĵusnaskito (*Altina, Idea, Mirinda, Venko; Espero, Fidul, Gravul*)
- kaj nom-unikeco (*Florida*, kaj ĝenerale ĉiuj esperantaj nomoj).

En multaj regionoj de Afriko estas kutimo krei novajn nomojn per la rimedoj de la loka lingvo; tial la ebloj pri lingva kreivo per nomdonado estas vastaj (Neethling 2000). En la kazo de la esperantaj nomoj el Afriko konstateblas la sama gvidlinio, ĉi-foje efektivigata per la uzo de la sufiksoj *-ind, -in, -id*, kaj aparte la antonomazie person-karakteriza *-ul*. Aliflanke nomoj kiel *Benata* aŭ *Benita* estas klasifikeblaj kiel eŭrop-devenaj nomoj (pli konkrete: kristanaj), tamen ankaŭ ili havas signifon.

## 5. Konkludoj

Kolektado kaj klasifikado de esperantlingva nomkorpuso pruvis, ke ekzistas nomportantoj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ grand-elcente en aliaj kontinentoj. Ĝenerale ili apartenas al la lingvokomunumo de Esperanto, sed estas kelkaj esceptoj. La analizo montras, ke la studita korpuso de esperantaj nomoj prezentas organizon analogan al tiu de antroponomastikaj sistemoj de aliaj lingvoj, al kiuj ĝi estas komparebla. Ilin influas genro, historia momento (kelkaj nomoj ne plu estas rigardataj kiel taŭgaj por nuntempo) kaj la estonta vivo de la gefiloj (respektante eventualan malliĝiĝon al la lingvo kaj ties kulturo). Krome, en ĝi oni povas distingi grupojn kaj subgrupojn, kiuj spegulas diversajn tendencojn, konstateblajn ankaŭ en nacilingvaj sistemoj. Notindas ankaŭ la ekzisto de regionaj nomgrupoj (Japanio, Gvineo golfo) kiuj, kvankam kundividas nomojn kun aliaj landoj, havas siajn proprajn. Tiel, la ensemblo de esperantaj nomoj sin montras kiel kompleksa antroponomastika sistemo, plene vigla kvankam magra pro la apartaj kondiĉoj propraj al ties lingvokomunumo.

## Bibliografio

- Boullón Agrelo & Ana Isabel 2007: A escolla dos nomes en Galicia a finais do século XX ‘La elekto de nomoj en Galegio fine de la 20a jarcento’. In: Luz Méndez & Gonzalo Navaza (eds.): *Actas do I Congreso Internacional de Onomástica “Frei Martín Sarmiento”*. Santiago de Compostela, 2, 3 e 4 de setembro de 2002. Santiago de Compostela: Asociación Galega de Onomástica / Instituto da Lingua Galega. 99-114.
- 2008: Antón, Sabela, Catuxa... De como os hipocorísticos deveñen en nomes ‘Antón, Sabela, Catuxa... Pri la maniero kiel karesnomoj iĝas antaŭnomoj’. En: Brea, M.; Fernández Rei, F.;

- Regueira, X. L. (eds): *Cada palabra pesaba, cada palabra media. Homenaxe ao profesor Antón Santamarina*. Santiago de Compostela: Universidade de Santiago de Compostela. 77-93.
- Boullón Agrelo & Ana Isabel & Tato Plaza, Fernando 1999: Personal names in Galicia as a sign of cultural identification: historical scope and current situation. In: *Onoma* 34: 14-44.
- Corsetti, Renato & Pinto, Maria Antonietta & Tolomeo, Maria 2004: Regularizing the regular: The phenomenon of overregularization in Esperanto-speaking children. In: *Language Problems and Language Planning* 20/3: 263-273.
- Esperantina Radoslavova Trickova, Vraca 1925: In: *Bildarchiv Austria. Österreichische Nationalbibliothek*. [www.bildarchiv.austria.at/Pages/ImageDetail.aspx?p\\_iBildID=5351666](http://www.bildarchiv.austria.at/Pages/ImageDetail.aspx?p_iBildID=5351666)
- Feixó Cid, Xosé 2003: *Diccionario galego do nomes*. Vigo: Xerais.
- Felecan, Ovidiu 2010: Antroponime recente romanice în Maramureş ‘Freşdataj latinidaj antaŭnomoj en Maramureş’. En: *Fonetică și dialectologie* XXIX. 5-19.
- Fiedler, Sabine 2012: The Esperanto denaskulo. The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community. In: *Language Problems and Language Planning* 36/2: 69-84.
- Gürpınar, Doğan 2012: What is in a Name? The Rise of Turkic Personal Male Names in Turkey (1908–38). In: *Middle Eastern Studies* 48:5: 689-706.
- Habibli, R. 2011: Pragmatic Meaning of Onyms. In: Matveeva, Galina G. & Zyubina, Irina A. (ed.): *IV International Conference on Pragmalinguistics and Speech Practices*. Newcastle upon Tyne: Cambridge Scholars Publishing. 215-217.
- Instituto dos Registos e do Notariado. *Vocabulos Admitidos ou Não Admitidos como Nomes Próprios*. [http://www.irn.mj.pt/sections/irn/a\\_registal/registos-centrais/docs-da-nacionalidade/vocabulos-admitidos-ou/](http://www.irn.mj.pt/sections/irn/a_registal/registos-centrais/docs-da-nacionalidade/vocabulos-admitidos-ou/)
- Internacia Jaro de Familio. Simpozio. Internacia Familio — Utopio aŭ Realajo. 06-09 julio 1994. Graz, Aŭstrio (1995). Maribor: *Inter-kulturo*
- Kalocsay, K. & Waringhien, G. 1985: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio
- Kohlheim, Rosa 1999: The change of cultural values as reflected in modern name-giving in Catalonia. In: *Onoma* 34: 229-248.
- Koopmans-Schotanus, Jelly 2007: *Preĝo por ĉiu Tago [Nova eldono]*. *Poděbrady: Kristana Esperantista Ligo Internacia*. <http://keli.chez.com/Preghlibreto%20reta.pdf>
- Kroniko/Crónica (Aprilo 1910). En: *La Suno Hispana* Jaro VII n° 76. 60. <http://www.gazetoteko.com/sh/sh76.pdf>
- Jagnjić, Ankica & Tišljar, Krunoslav (reĝisoroj) 1994: *Kreski kun Esperanto [videoregistraĵo]*. *Roterdamo: Universala Esperanto Asocio*. 39:03 min.
- López Franco, Yolanda Guillermina 2009: La prénomination à Tlalnepantla de Baz, État de México, au Mexique, tout au long du XXe siècle. In: *Proceedings of the 23rd International Congress of Onomastic Sciences*. York: York University. 688-698.
- Mora Monroy, Siervo Custodio 1976: Breve estudio sobre apellidos y nombres propios de persona en Colombia ‘Mallonga studo pri familiaj kaj personaj nomoj en Kolombio’. In: *Thesaurus*. Boletín del Instituto Caro y Cuervo 31 (3): 536-560.
- Morărașu, Nadia Nicoleta & Drugă, Luminița 2011: Projecting the ethnic identity of Romanian gipsy/roma through contemporary first name-giving practices. In: *Onoma* 46. 77-96.
- Naumann, Horst et al. 1987: *Familiennamenbuch der DDR* ‘Libro de familiaj nomoj de GDR’. Leipzig: VEB Bibliographisches Institut.
- Neethling, S. J. 2000: An onomastic renaissance: African names to the fore. In: *South African Journal of African Languages* 20:3: 207-216.
- NPIV. *La Nova Plena Ilustrita Vortaro*. 2002. Parizo: SAT
- Raátz, Judit 2008: Trends in the choice of first names in Hungary since the second half of the 20th century. In: Arcamone, Maria Giovanna & De Camilli, Davide & Porcelli, Bruno (eds): *XXII Congresso Internazionale di Scienze Onomastiche* (28.8–4.9.2005) II. Pisa: ETS. 195-207.

- Saarelma, Minna 2009: African and European anthroponymic systems – similarities and differences. In: *Onoma* 44: 191-216.
- Totsche, L. 1932: *De paĝo al paĝo*. Budapest: Literatura Mondo
- Trebeș, Tatiana 2014: Tendințe de modernizare a sistemului onomastic tradițional (cu referire la prenumele din orașul Orhei) ‘Tendencoĵ al modernigo de la tradicia onomastika sistemo (koncerne la antaŭnomojn el urbo Orhei)’. In: *Limba Română*, nr. 2: 63/69.
- Valén, Antonio 2004: *El esperanto: lengua y cultura*. Santander: mga
- Watanabe, Noriko 2009: Politics of Japanese naming practice: language policy and character use. In: *Current Issues in Language Planning* 8:3: 344-364.
- Wennergren, Bertilo 2005: *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Elektronika versio. <http://bertilow.com/pmeg/>.
- Zăbavă, Elena-Camelia 2008: Onomastica românească sub influența modei lingvistice europene ‘Rumana onomastiko sub influo de eŭropaj lingvomodoĵ’. In: *Distorsionări în comunicarea literară și etnofolclorică românească și contextul european* ‘Deformadoĵ en rumana literatura kaj etnofolkloro komunikado kaj la eŭropa kunteksto’. Iași: Alfa. 393-400.
- 2009: Sistemul antroponimic oltenesc. Caracteristici generale ‘Onomastika sistemo de Oltenia. Ĝeneralaj trajtoj’. In: *Analele Universității din Craiova. Seria Științe filologice. Lingvistică*. Anul XXXI, nr. 1-2: 416-423.